## Veranstaltungshinweise

Unsere Esp.-Lernrunden für: a) Anfänger m. Vorkenntnissen (Stufe A2[1)]): Mi. 18:00-19:30 Uhr, Gemeindehaus d. kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1[1)]): Do. 19:15-20:45 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake.

[1)]Stufen: s. http://de.wikipedia.org/wiki/Gemeinsamer_Europ%C3%A4ischer_Referenzrahmen

| | | |
|---|---|---|
| 20.10.2011 19:30 Uhr | Gaststätte *Weserterrassen*, Strandallee 10, 26954 Nordenham | Vereinstreffen |
| 24.11.2011 19:30 Uhr | Gaststätte *Weserlust*, Kaje 1, 26919 Brake | Vereinstreffen mit Weihnachtsfeier |
| 19.01.2012 19:30 Uhr | Gaststätte *Müggenkrug*, Elsflether Str. 52, 26125 Oldenburg | Vereinstreffen |

Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm entnommen o. bei Alke Geveke, Tel.: 0177-1755475, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

| | | |
|---|---|---|
| 05.11.2011 | 8. *Rata Rendevuo* der Esperanto-Gruppe Hameln | Bückeburg |
| 16.-20.05.2012 | Printempa BARo 2012 | Bad Münder |
| 19.-25.05.2012 | 64a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso | Herzberg am Harz |
| 25.-28.05.2012 | 89. Deutscher Esperanto-Kongress gemeinsam mit den dänischen und polnischen Nachbarlandes-verbänden | Berlin-Lichtenberg |
| 16.-20.07.2012 | 9. Kongress der Europäischen Esperanto-Union | Galway, Irland |
| 28.07.-04.08.2012 | 97. Esperanto-Weltkongress | Hanoi, Vietnam |
| 18.-25.08.2012 | 79. Italienischer Esperanto-Kongress | Mazara del Vallo (Sizilien), Italien |

***Ĝojan kristnasko-feston kaj bonan gliton en la novan jaron!***
***Ein frohes Weihnachtsfest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!***

-----------------------------------------------------------------------------------------------------

**Impressum:**

| | |
|---|---|
| *Zeitschrift:* | Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330) |
| *Erscheinungsweise:* | dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe, Netzseite: http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm |
| *Herausgeber:* | Esperanto-Gruppe Unterweser e. V. (http://www.esperanto.de/unterweser) |
| *Information und Redaktion:* | Anne Höpken, Schulstr. 13a, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837<br>Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368<br>Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044<br>Mario Müller, Tel.: 04732-1373 |
| *Bankverbindung (für Beiträge und Spenden):* | Raiffeisenbank Oldenburg eG<br>BLZ 28060228<br>Kontonummer 1200160000<br>(Kassenwartin: Dörte Bierkämper) |


***E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.***

# Esperanto Gazeto

**N-ro 32** ISSN 1861-3330 **Okt. 2011– Jan. 2012**

EGU-Info: http://www.esperanto.de/unterweser



**Kopenhagen, *Bella Center*, 26.07.2011:** Sechs Teilnehmer des 96. Esperanto-Weltkongresses
**Kopenhago, *Bella Center*, 26-a de Julio 2011:** Ses partoprenantoj de la 96a Universala Kongreso de Esperanto

**Maja ekskurso 2011**
**(Bremen-Vegesack, Bremen-Schönebeck, Leuchtenburg,**
**21-a de Majo 2011)**

Komune kun la Esperanto-grupo de Bremeno okazigis nia klubo la Majan ekskurson 2011. Ĉe ĝi ni povis bonvenigi ankaŭ kelkajn membrojn de Esperanto-Asocio Hamburg. Post tagmanĝo en la havena kvartalo de Vegesack ni migris ĉe belega vetero laŭlonge de la malgranda rivero Schönebecker Aue al kastelo Schloss Schönebeck. En parto de ĝia muzeo temas pri marveturado. Por niaj gastoj el Pollando kaj Japanujo la gvidado estis tradukita en Esperanton. La ekskurso finiĝis per kafumado en la proksime situa Malsupra-Saksa Leuchtenburg. – Andreas


*An der Weser in Bremen-Vegesack / Ĉe Vezero en Bremen-Vegesack*

**Mai-Ausflug 2011**
**(Bremen-Vegesack, Bremen-Schönebeck, Leuchtenburg,**
**21.05.2011)**

Gemeinsam mit der Esperanto-Gruppe Bremen veranstaltete unser Verein den Mai-Ausflug 2011. Dazu konnten wir auch einige Mitglieder des Esperanto-Vereins Hamburg begrüßen. Nach dem Mittagessen im Hafenviertel von Vegesack wanderten wir bei herrlichem Wetter entlang dem kleinen Fluss Schönebecker Aue zum Schloss Schönebeck. In einem Teil seines Museums geht es um Seefahrt. Für unsere Gäste aus Polen und Japan wurde die Führung ins Esperanto übersetzt. Der Ausflug endete beim Kaffeetrinken im nahe gelegenen niedersächsischen Leuchtenburg. – Andreas


*Schloss Schönebeck / Kastelo Schloss Schönebeck*



## *Enigmo*

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | 7 | | 9 | | |
| 6 | | | | 8 | | |

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de Afrika lando.

### *Horizontale*

***1:*** akiri per monpago [en as-tempo]; ***2:*** kurba frukto kun flava ŝelo; ***3:*** vertebra kolono [kun finaĵo de akuzativo]; ***4:*** tre forta timo; ***5:*** instrumento [sen finaĵo]; ***6:*** hispane: nin; ***7:*** rivero tra Munkeno [germana nomo]; ***8:*** mallarĝa tabulo, uzata por gliti surneĝe [sen finaĵo].

### *Vertikale*

***1:*** sin detenadi, ekz. je alkoholaĵoj [sen finaĵo]; ***2:*** kapvestaĵo; ***3:*** sin movi enen [en is-tempo]; ***4:*** transformi felojn en ledon [en kondicionalo]; ***5:*** kapuĉhava vent-rezista jako [sen finaĵo]; ***6:*** estigi sonon plu ekzistantan post la ĉeso de ĝia kaŭzo; ***9:*** aŭtosigno de Stuttgart.


*Konzert von JoMo am 12.06.2011 beim Kongress in Münster / Koncerto de JoMo en la 12a de Junio 2011 ĉe la kongreso en Monastero*

**Spätherbst**

Der graue Nebel tropft so still
Herab auf Feld und Heide,
Als ob der Himmel weinen will
In übergroßem Leide.

Die Blumen wollen nicht mehr blühen,
Die Vögel schweigen in den Hainen,
Es starb sogar das letzte Grün;
Was sollt' er da nicht weinen.

Hermann Allmers (1821-1902)

**Autunfino**

Kviete gutas la griza nebulo
Suben al kampo kaj erikejo,
Kvazau volas nun farighi plorulo
Chiel' tro sufera en chi ejo.

En la boskoj silentas chiu birdo,
Plu volas flori neniu floro,
Pereis chie ech la lasta verdo;
Kial do ne la chiela ploro.

(el la germana esperantigis Andreas)

## 96a Universala Kongreso de Esperanto
## (Kopenhago, Danujo, 23a ĝis 30a de Julio 2011)

El nia klubo partoprenis Alke, Anne, Andreas, Brigitte kaj Mario en tiu ĉi kongreso (1458 partoprenantoj el 66 landoj). La plej multaj aranĝoj okazis en "Bella Center" (ĉ. 6 km for de la urbocentro). La kongresa temo estis "Dialogo kaj interkompreno". Por akceli ambaŭ ankaŭ inter la diversaj aĝgrupoj de tiu ĉi kongreso, estis aparta junulara programo. Ankaŭ ne-junuloj rajtis partopreni en ĝi kaj kontribui al ĝi.



*Im Hirschpark Jægersborg / En cervoparko Jægersborg*

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio organizis tuttagan ekskurson al cervoparko Jægersborg, Øresund-plaĝo kaj Kristianio (t. e. kvazaŭ-aŭtonoma Kopenhaga kvartalo de alternativa loĝkulturo). Tiu ekskursa tago estas memorinda ankaŭ pro tio, ke ĝuste tiam estis bela vetero – kontraste al preskaŭ ĉiuj aliaj kongres-tagoj. La distra programo enhavis multajn koncertojn, el ili unu publikan sub libera ĉielo, kaj pliajn ekskursojn por konatiĝado kun ekzemple la vivo de la Vikingoj. En la Nacia Vespero en Tivoli, la konata Kopenhaga amuzparko, reprezentis ĥoro Gronlandon. En prelegoj oni pritraktis verkojn kaj meritojn de danaj sciencistoj, kiel ekzemple Paul Neergaard (agronomo kaj esperantologo), Ole Rømer (astronomo), Hans Christian Ørsted kaj Niels Bohr (fizikistoj). En la Esperantologia Konferenco kaj Terminologia Forumo estis informite pri aktualaj projektoj koncernantaj temojn, kiel ekzemple la jenajn: Vikipedion, permaŝinan tradukadon, la planatan enretigadon de la Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kaj spertojn de sekcio de la Akademio de Esperanto okaze de la prilingva kontrolo de fakvortaro. – Andreas



*In Christiania / En Kristianio*



## 96. Esperanto-Weltkongress
## (Kopenhagen, Dänemark, 23.-30.07.2011)

Aus unserem Verein nahmen Alke, Anne, Andreas, Brigitte und Mario an diesem Kongress teil (1458 Teilnehmer aus 66 Ländern). Die meisten Veranstaltungen fanden im „Bella Center” statt (etwa 6 km vom Stadtzentrum entfernt). Das Kongressthema war „Dialog und gegenseitiges Verstehen”. Um beides auch zwischen den verschiedenen Altersgruppen dieses Kongresses zu fördern, gab es ein spezielles Jugendprogramm. Auch Nicht-Jugendliche durften daran teilnehmen und dazu beitragen. Der Weltbund esperantistischer Vegetarier organisierte einen ganztägigen Ausflug zum Hirschpark Jægersborg, Øresund-Strand und nach Christiania (d. i. ein quasi-autonomes Kopenhagener Stadtviertel alternativer Wohnkultur). Der Ausflugstag war auch deshalb denkwürdig, weil gerade dann schönes Wetter war – im Gegensatz zu fast allen anderen Kongresstagen. Das Unterhaltungsprogramm beinhaltete etliche Konzerte, darunter ein öffentliches unter freiem Himmel, und weitere Ausflüge zum Kennenlernen von beispielsweise dem Leben der Wikinger. Am nationalen Abend im Tivoli, dem bekannten Kopenhagener Vergnügungspark, repräsentierte ein Chor Grönland. In Vorträgen behandelte man Werke und Verdienste dänischer Wissenschaftler, wie z. B. Paul Neergaard (Agronom und Esperantologe), Ole Rømer (Astronom), Hans Christian Ørsted und Niels Bohr (Physiker). In der Esperantologie-Konferenz und im Terminologie-Forum wurde über aktuelle Projekte informiert, die Themen betreffen, wie z. B. die folgenden: Wikipedia, maschinelles Übersetzen, das geplante Ins-Netz-Stellen des Neuen Vollständigen Illustrierten Wörterbuchs des Esperanto und Erfahrungen einer Abteilung der Esperanto-Akademie bei der sprachlichen Kontrolle eines Fachwörterbuchs. – Andreas



*Freilichtkonzert / Koncerto sub libera ĉielo*



*Astronomie-Vortrag / Astronomi-prelego*

## Komuna Nederlanda kaj 88a Germana Esperanto-Kongreso (Monastero, 10a ĝis 13a de Junio 2011)

La kongresejo estis la katolika klerigejo “Haus Mariengrund”. Ĝi situas iom ekster la urbocentro. Ĝian foreston tamen kredeble rimarkis apenaŭ iu el la ĉ. 130 partoprenantoj el dek unu landoj, ĉar la aranĝoj estis allogaj kaj interesaj: Grandioza etoso regis en la portempe establita “drinkejo”, kaj en sia koncerto la franca muzikisto JoMo igis la homojn danci per kantoj en diversaj lingvoj. Per interesaj prelegoj pri la platdiĉa lingvo kaj etnaj minoritatoj kontribuis nia klubano Uwe Joachim Moritz al la kongreso, kies temo estis “Najbaroj en Eŭropo”. En ekskursoj oni povis konatiĝi kun Monastero, kastelo Hülshoff, bieno Rüschhaus kaj naturrezervejo Rieselfelder. Notinda strategia temo estas la Sunmontaj Gvidlinioj por Eŭropa lingvopolitiko. Ili estis aprobitaj de la membrokunveno de Germana Esperanto-Asocio (http://www.esperanto.de/gea/gvidlinioj.html). – Andreas



*Uwe Joachim Moritz trägt über die plattdeutsche Sprache vor / Uwe Joachim Moritz prelegas pri la platdiĉa lingvo*

## Gemeinsamer Niederländischer und 88. Deutscher Esperanto-Kongress (Münster, 10.-13.06.2011)

Das Kongressgebäude war das katholische Bildungshaus „Haus Mariengrund”. Es liegt etwas außerhalb des Stadtzentrums. Das vermisste aber wohl kaum einer der etwa 130 Teilnehmer aus elf Ländern, denn die Veranstaltungen waren attraktiv und interessant: Eine großartige Stimmung herrschte in der vorübergehend eingerichteten „Kneipe”, und in seinem Konzert brachte der französische Musiker JoMo die Leute mit Liedern in verschiedenen Sprachen zum Tanzen. Durch interessante Vorträge über die plattdeutsche Sprache und ethnische Minderheiten trug unser Vereinsmitglied Uwe Joachim Moritz zum Kongress bei, dessen Thema „Nachbarn in Europa” war. In Ausflügen konnte man Münster, die Burg Hülshoff, das Gut Rüschhaus und das Naturreservat Rieselfelder kennenlernen. Ein bemerkenswertes strategisches Thema sind die Sonnenberger Leitsätze zur europäischen Sprachenpolitik, die von der Mitgliederversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes beschlossen wurden (http://www.esperanto.de/gea/gvidlinioj.html). – Andreas



*Kreiseltisch / Turbotablo*



## Septembra ekskurso 2011 (Hamburgo, 3a de Septembro 2011)

Post la sukcesa renkontiĝo kun Hamburganoj en Bremen en Majo ok esperantistoj el nia regiono ekvojaĝis al la Alster-metropolo por reciproka vizito. En sunplena vetero Kerstin kaj aliaj membroj de Esperanto-Asocio Hamburg gvidis nin tra la daŭre kreskanta kaj ŝanĝiĝanta havena kvartalo nome "HafenCity" kaj montris ĝiajn vidindaĵojn, ekzemple la stokejkvartalon kaj Elbo-koncertdomon (“Elbphilharmonie”). Fine de la ekskurso ni ŝipe veturis al muzehaveno Oevelgönne kaj kafumis tie en restoraciŝipo. – Anne, Dörte, Andreas



*Am* Kesselhaus */ Ĉe* Kesselhaus *(kaldrondomo)*

## September-Ausflug 2011 (Hamburg, 03.09.2011)

Nach dem gelungenen Treffen mit Hamburgern in Bremen im Mai machten sich acht Esperantisten aus unserer Region auf in die Alster-Metropole zu einem Gegenbesuch. Bei sonnigem Wetter führten uns Kerstin und andere Mitglieder des Esperanto-Vereins Hamburg durch das stetig wachsende und sich verändernde Hafenviertel namens „HafenCity" und zeigten seine Sehenswürdigkeiten, z. B. die Speicherstadt und Elbphilharmonie. Am Ende des Ausflugs fuhren wir per Schiff zum Museumshafen Oevelgönne und tranken dort in einem Restaurantschiff Kaffee. – Anne, Dörte, Andreas



*Kreuzfahrtschiff* Aida luna */ Krozŝipo* Aida luna